



OOMOTO

INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Sidejo : 49, rue Boulevard, PARIS (14^e)

Telegrafa adreso :
EUROPOMOTO-PARIS

La celo de la homodum la materia vivado estas bela nomo, alta rango, longa vivo kaj granda riĉaĵo. Ĉio-ĉi tio estas kara por la korpo. Neniom valora ĝi estas por homo, post la morto.
O. DEGUĈI.

Jarabono por Francujo : 15 fr. fr.

Redaktoro : K. NIŜIMURA

Jarabono por aliaj landoj : 3 sv. fr.

☆ Poŝtmandatoj devas esti sendataj al la persona nomo de la redaktoro. ☆

La Psikologiaj Bazoj de la Lingvo

Antaŭ nelonge, mi tre vigle diskutis kun unu el miaj amikoj — jurita malamiko de Esperanto. Li ankoraŭ vivas kun sia fiksideo, ke baldaŭ la muziko fariĝos internacia lingvo kaj la homoj interparolados per konvenciaj melodioj, ĉu kantataj, ĉu ludataj, ĉu (por individuoj nemuzikemaj) nur simple *ritmataj*. Tiu-ĉi persono pie atendas la « oran epokon », kiam la tuta tero reeĥos la kantojn de la senplumaj najtingaloj.

Al tio mi respondis, ke li tute ne konas la esencon de la lingva problemo. Ĉiuj lingvoj — ĉu naturaj, ĉu « artefaritaj » estas muziko multe pli perfekta kaj multe pli komplika ne nur ol la « konvenciaj melodioj », kiujn li intencas elpensi, sed ankaŭ ol la tuta nuntempa voĉa muziko — aserto tute ne aprioria; sed bazita sur plej modernaj akustikaj kaj muzikologiaj esploroj, kiujn mi ne povas tie ĉi prustudi pro manko da spaco. La *vorto* estas komplika melodio, kiun eĉ la plej lerta virtuozo per la plej perfekta muzikinstrumento ne povas plenumi, nek imiti. Ĝi entenas tiom multe da tonoj, duontonoj, kvarontonoj, okontonoj, ktp., tiom da alikvotoj (supertonoj), tiom da malfacilaj intervaloj kaj tiel komplikajn ritmojn. Nur surduloj aŭ homoj sen ia ajn muzika gusto povas ne rimarki la melodion kaj la ĉarmon de la vorto. *Lingvo kaj muziko estas sinonimoj.*

Kio do estas la vorto — tiu mirinda muzikaĵo, el kiu estas teksitaj la plej ĉarmaj poemoj, kiu povas en unu momento ribelinciti la popolon, sovaĝigi la armeojn, kiu povas renversi la kronojn, movigi la manojn de la mortiganto, kiu kapablas alporti ĝojon, feliĉon, koleron, uraganon aŭ morton?

Fundamenta elemento de la vorto kaj de la melodio estas *la sono*. La sonoj grupigitaj laŭ la leĝoj de *la ritmo*, formas tion, kiun la filologoj nomas « vorton », kaj la muziko-

logoj — « melodion ». (La leĝoj de la ritmo regas ankaŭ la sonojn mem). Ĉiun vorton vivigas unu psikologia ŝtato de la parolanto : ideo, sento aŭ deziro — komplikaj. La internaj animistatoj manifestiĝas per fizikaj movoj de niaj organoj : cerbo, nervoj, muskoloj, pulmoj, koro, gorgo, buŝo. Ekz., la movado de la pulmoj, puŝataj de tiu ĉi animistato, forpelas la aeron trovigantan en ili laŭ intenco, kiu dependas de la pli aŭ malpli forta psikologia travivaĵo. La sama travivaĵo efikas ankaŭ la muskolojn de la gorgo, kiuj kuntiriĝas, plilongiĝas, kurbigigas kaj simile al trumpeto

vorto posedas ankaŭ animon, kiu konsistas el tiu psikologia enhavo, al tiu ideo, sento aŭ deziro, kiun nia animistato komunikas al ĝi en donita momento; enhavo, kiŭ donas al la vorto ĝian vivon kaj potencon. Tiu vivanta aero, elektrizata de nia korpa elektro posedas energion meĥanikan, elektran kaj spiritan, kies efiko sur la aŭskultanto dependas de ĝia pli aŭ malpli granda potencialo — meĥanika, elektra aŭ spirita — komunikata de ni al tiu *vivanta vorto*. Ni ne forgesu, ke nia cerbo kaj nervosistemo — eĉ nia tuta korpo — reprezentas mirindan radiocentralon, kiu ĉi-


momente sendas kaj ricevas kune kun la sonoj kaj vortoj — elektrajn ondojn. La vorto t. e. la vivanta aero elektrizita, efikas la elektromagnetan kampion de la cerbo. Meĥanike ĝi efikas sur nia orelo kaj spirite — sur nia psikologia vivo, vekante laŭ indukto similajn ideojn, sentojn aŭ dezirojn.

La lingvo do estas procedo de kreado. Kiam ni parolas, ni naskas estaĵojn vivantajn, al kiuj ni konfidas specialan taskon, kiujn ni devigas fari utilan (ofte danĝeran!) laboron. Ni ne forgesu, ke la parolado estas diservo kaj la lingvo — sanktaĵo. Ĉiuj religioj konsideras la vorton ne kiel sensencan eldiraĵon, sed kiel sanktan vivantaĵon.

La saĝuloj el la Oriento konas vortojn aŭ frazojn, kiuj kantataj kun konvenaj melodioj okazigis miraklojn. La hindoj nomas tiujn formulojn « mantrajn ». Per tiuj sanktaj melodioj ili hipnotigas tigrojn kaj serpentojn kaj sendanĝerigas ilin. La jurajoj kaj nekomprenablaj babilaĵoj de la magiistoj, la « inkantacioj » (1) de la sorĉistinoj, la preĝaj formuloj de la kredantoj — estas palaj restaĵoj de la sankta sekreta lingvo, kreita de praa elito kaj perdita nuntempe.

Ĉiuj religioj atribuas unuanime ian spiritan potencon al la lingvo kaj speciale al la vorto. Sankta Johano parolas en sia evangelio pri la krea potenco de la parolo, la Oomoto sanktaj skribajoj proklamas le regnon de la *vortanimo*:

(1) Magiaj melodioj kantataj multfoje, kiuj posedas hipnotan forton.



S-ro Perch Proctor, aŭstralia teozofisto, vizitis S-ron Deguĉi (centro), en Kameoka, lastan julion. Tiu ĉi bildo montras ilin kaj Oomoto-Esperantistaron.

komencas vibri sub la premado de la aero tiel same, kiel la kordo vibras sub la frotado de l'arĉo. Modelata per la plej diversaj kuntiriĝoj kaj plilarĝiĝoj de la gorgaj kaj buŝaj muskoloj, la vibranta aero, kiu troviĝas en tiuj organoj kaj kiu eliras el la buŝo, prenas specialan formon por ĉiu psikologia travivaĵo. Se ni anstataŭ aeron elspiras fumon parolante, aŭ kantante — ni povus eĉ rimarki tiujn tre komplikajn formojn. (Tiurilate, la lertaj fumuloj povas fari tre interesajn eksperimentojn!)

La vorto do estas vivanta organismo, kiu, same kiel la homo, posedas materian korpon kun donita formo (la elspirata vibranta aero) : Tiu korpo moviĝas (vibras) kaj vojaĝas tra la spacoj, ĝis la oreloj de l'aŭskultanto. Sed la

la hebreaj kabalistoj (1) de antikvaj tempoj mirakle agis kaj per vortaj, ciferaj aŭ melodiaj formuloj obeigis la naturon, divenadis la nebulan estontecon kaj interrilatigis kun keruboj kaj serafoj; la egiptanoj konsideris la parolan kaj la skriban lingvojn kiel sanktaĵojn kaj tial nur la iniciitaj diservistoj povis skribi kaj legi la sanktajn sekretajn hieroglifojn.

Unuvorte nur la popoloj, kiuj adoris sian lingvon, por kiuj la lingvo estis kulto kaj religio, nur tiuj popoloj kreis eternajn kulturojn kaj, konservinte sian lingvon, ili konservis sian spiriton dum la jarcentoj. Ĉar la lingvo estas la kolektiva spirito de la popolo.

Se ni, esperantistoj, volas, ke nia lingvo triumfu kaj kreu la estontan tutmondan kulturon, ni devas imiti la ekzemplon de la saĝaj antikvaj popoloj, por kiuj la lingvo ne estis nur babilajo, nek « filatelio » — sed kulto kaj diservo.

LOHEN GRIN.

Virina Pozicio en Oomoto

Okaze de la datreveno de naskiĝtago (la 12-an de julio) de S-ro O. Deguĉi, oni kalkulis preskaŭ 600 novajn propagandistojn de Oomoto, kiuj estis nomitaj en Japanujo. Inter ili 35 virinoj troviĝas. Jam antaŭ tiu okazo, centoj da gepropagandistoj — misiistoj laboris. Lastan aŭguston en Lausanne, Svisujo, okazis la internacia konferenco pri la kristana kredo kaj ordo, kie virinaj delegitoj faris deklaron kaj postulis, ke oni donu ankaŭ al la virinoj egalajn laboron kaj loĝon de respondeco, kiel al la viroj. Nun oni povas konstati, ke Oomoto donas tute egalan laboron kaj egalan lokon al virinoj, kiel al viroj, antaŭ ol ili petu, dum la okcidentaj virinoj ilin postulas per deklaracio.

(1) Kabalo — sekreta scienco pri la rilatoj inter la sonoj, la vortoj, la nombroj kaj la teraj okazantaĵoj.

Ĉu Eŭropo estas en krizo de milito?

Raportoj venintaj el Eŭropo pri la politika situacio estas diversaj. Multaj amerikanaj vizitantoj parolas pri la eŭropa restarigo kaj pri malrapida, sed certa forigo de la militkrizo. Sed tiuj, kiuj studis la aferojn de la kontinento en intima kontakto kun ili dum longa kaj senrompa eksperimento ŝajnas esti pesimistaj. Antaŭ kelka tempo ni aŭskultis paroladon de kompetenta ĵurnalisto, kiu ĵus revenis al nia lando post kelkaj jaroj de loĝado en diversaj partoj de Eŭropo. Li insistis, ke frue aŭ malfrue, la dua eŭropa milito ne estos evitebla. Li asertis, ke tia milito okazos iam ajn. Li ne povas esperi pacon.

La atentemaj legantoj povas trovi senombrajn konfirmojn de tiu ĉi vidpunkto inter la linioj de nunaj eŭropaj informgazetoj. Plej impresaj estas la direktaj komunikadoj en formo de leteroj aŭ artikoloj, kiuj venas el Eŭropo. Estas evidente, ke jam nun nuboj de malespero kaptas la sentemajn observantojn, ĉar ĉiuj raportoj pri la minacantaj okazintaĵoj estas mallumaj. Unu el niaj konfidindaj korespondantoj, ekzemple, skribas al Francujo jene:

« La situacio estas malluma. Mi lastatempe aŭdis pri multaj aferoj, kiuj ankoraŭ ne estas presitaj. Kiam oni rigardas kaj aŭskultas, tiam estas malfacile ne veni al la konkludo, ke la dioj, dezirante ĉerui la homaron, unue frenezigis ĝin. Tamen laŭ mia opinio, la nacioj mem havas la grandan respondecon por tio.

« Vi sendube aŭdis, ke la faŝistoj estas proksimaj al Nice por ataki ĝin. Mussolini lastmomente provis ilin trankviligi, sed estas preskaŭ neniu dubo, ke baldaŭ li bruligos ie flaman fajron. Winston Churchill kaj Chamberlain sendube povus paroli al ni pli multe.

Due staras problemoj de Besarabio, kiu farigas la dua Alsace. Antaŭ kelkaj tagoj unu el miaj amikoj asertis, ke la hispana parlamento voĉdonis sep milionojn da pesetoj por plifortigo de la Balearaj insuloj. Tiam Francujo estos interrompita de siaj kolonioj, k. t. p. »

Tiu ĉi korespondanto sendas al ni leteron de kompetenta observanto. Jen estas parto el tiu ĉi letero:

« Mi estas iom malkuraĝigita pro la nuna politika situacio. Mi timas, ke niaj anglaj amikoj nuntempe koncentras tro multe sian forton en Ĥinujo. Ĥinujo estas certe danĝera parto kaj samtempe malbona ekzemplo de antagonismo inter brita imperialismo kaj azia naciismo. Sed mi timas, ke estas danĝeraj partoj multe pli gravaj en Eŭropo mem. La proksima estonto ŝajnas al mi tre malluma. Grafo Bethlen en Hungarujo certe preparas monarĥan subitan ŝanĝon kaj volas surtroniĝi unu el la antaŭaj aŭstraj arhidukoj. Flanke de Hungarujo, tio estas granda peno por regajni Slovakujon kaj la tielnomitan Burgenlandon, kiu estis cedita al Aŭstrujo. Kiaĉ mi diras, ke Bethlen esperas la subtenon de Granda Britujo, Italujo kaj Rumanujo, mi apogas min sur aŭtentika informajo de miaj eŭropaj amikoj. La Malgranda Alianco ne povos kontraŭstari tiun ĉi movadon, ĉar Rumanujo firos de Malgranda Alianco kaj Jugoslavujo estos malhelpata de Italujo, kiu profitigos tiun ĉi okazon por alligi al si Dalmation. Vi scias kiel intima estas la amikeco inter Mussolini kaj la nuna brita registaro kaj aliflanke kiel intima estas la amikeco inter Italujo kaj Rumanujo.

« La alia danĝera parto, laŭ mia opinio, intime ligita kun la hungara afero, estas Litovujo, kie lastatempe okazis subita revolucio kaj militistara partio havas influon, favorante la alproksimiĝon al Polujo, Litovujo helpas Polujon. Tamen la naciista germana registaro volonte ekspluatos tiun ĉi okazon por ataki Polujon de la okcidenta flanko kaj la ĝenerala fajrero nature sekvos. Eble tiu ĉi bildo aspektas

La Reveno de Kristo al Jerusalemo

(de Majstro O. DEGUĈI)

El la *Rakontoj de Spirita Mondo*

XIII

LA PROVO

(1642-a ĉapitro de la *Rakontoj el la Spirita Mondo*)

POEMETO TRADUKITA EN PROZO

Vravasa, trovinte homan figuron ĉe la sojlo de la preĝejo, diris en poezia formo:

« Kio povas esti la objekto staranta ĉe l'preĝejo? mi tion tre dezirus ekscii ».

« Mi estas persone veninta el Hinode Insulando, propagandisto, kiu vizitas tiun-ĉi sanktanan lokon »;

La viro staranta respondis: « Mi estas maljunul', kies nom' estas Svafford, Diservanto, kredanto de l'America Koloni' ».

« La luno estas kovrita de malpezaj nuboj kaj pro tio mi ne distingis vin ».

(Fino de la poemo.)

Vravasa: Ĉu vi estas Sinjoro Svafford? Ho, pardonu min. Kial vi venis tien-ĉi sola je tiu-ĉi horo?

Svafford: Kvankam mi estas korpe maljuna, anime mi estas kvazaŭ 18-jaraĝa. Mi estis vaginta tien-ĉi nur pro amo... Hahaha... Kaprica koro kaptas, simile al hiono — fortan virinon malgraŭ lia forta rezisto kaj firma decid', ke li ne atentos pri la virin'... Verdire la homa volo estas malforta. Kuraĝaj ĝeneraloj, kiuj kapablas komandi grandajn armeojn, kelkafoje senfortiĝas, pro sola rigard' de virina okul'... Tia estas jam la homa sorto, Aahaha...!

— Vravasa sentas sin pikita je la koro. Li pensas: « Mi timas, ke tiu-ĉi maljunulo aŭdis la interparolon de mi kaj de Mario. Mi supozas, ke li aludas per siaj sencplenaj vortoj. Mi hontas. Kaj nun mi havas nenion por diri al la maljuna sinjoro; Dia puno estas subita. Kial mi ne rifuzis la minacon de Mario? Mi mem miras pri la malforteco de mia volo! Ne, ne, la kaŭzo ne estas sole mia malforta volo; la kulpulo estas demono, loĝanta en mia korpo. Forlasinte miajn edzinojn kaj filinojn en Hinode Insulando, ok mil mejlojn malproksima de tie-ĉi, kaj sentante min sole, mi neglektis apogi min al la ĉiompotencia Dio. Pro tio malica demono okupis mian korpon kaj inspiris al mi tiajn maldecidemajn kaj evitemajn vortojn. Mi faris malpian aferon neforigeblan. Kaj kiel mi povos nun respondi al tiu-ĉi sinjoro?... » Vravasa krucis siajn brakojn kaj mallevante sian kapon fikse rigardis la teron.

Svafford: Nu, Sinjoro Vravasa, mi ĝojas, ke vi ne uzis mensogajn kaj evitemajn vortojn, kiel decas al reprezentanto de Rutbahaismo.

Virinoj estas kompare honestaj kaj naivaj. Ili sincere kredas la vortojn de viro, sed ili trovas eĉ unu vorton da mensogo en la parolo de viro, tiam ili batalas por la viko. Ĉu vi ne faris promeson al iu virino?

Vravasa: Jes... Tio estas... Mi faris nevolan promeson kaj mi vere hontas. Ĉu vi aŭskultis, nian tutan interparolon?

Svafford: Hahaha! Miaj oreloj ne estas tiel aĝaj kiel mi mem. Sed vi ja parolis tiel laŭte pri via ama kontrakto. Mi neniu vorton perdis kaj ĉion aŭdis. Vi estas forte amata, ĉu ne? Hahaha!

Vravasa: Mi tute konfuziĝis. Ĝi faris disputon kvazaŭ minacante per glavo. Mi havis nenian rimedon por kontraŭbatali sin kaj nevole mi akceptis sian proponon. Propagandisto, kiu mi estas, kiel mi povus okupiĝi pri amaferoj?

Svafford: Tie-ĉi vi mensogis al fraŭlino Mario. Ĉu via sintenado ne estas kondamninda? Mi jam aŭdis, ke la popolo de Hinode Lando konsistas el mensuguloj kaj, ke ni devas esti ĉiam singardemaj kontraŭ ili. Mi tamen kredis, ke propagandisto de Dia entrepreno faros escepton kaj neniel mensogos. Sed se la propagandisto estas tia, ĉiuj personoj venintaj el la Hinode Lando estas malfidindaj. Kiel oni povus esperi, ke el tia lando aperos la Savanto de la tuta homaro? Mi tute perdas la esperon.

Vravasa: Ne, ne, ne ĉiuj en Hinode Insulando estas mensuguloj. Mi nur diris nevolan promeson por savi la virinojn kaj por trankvil-

tre pesimisma, sed dum la lasta semajno mi ricevis multajn konfidindajn informojn el miaj diversaj kontinentaj amikoj pri tiu ĉi demando, kaj mi kredas, ke almenaŭ la duono estas vera. Ni do devas rigardi ne nur Hin-ujon sed ankaŭ la orientan kaj la centran partojn de Eŭropo, kiel dangeŝajn zonojn.

«Krom tio mi volas atentigi vin pri la fakto, kiun mi jam montris al vi semajnon antaŭe, nome pri la intenco enkonduki militan rekrutvarbadon en Mesopotamio. Mi skribis tiam, ke la nuna ĉefministro de Mesopotamio, Jaffar Pasha de Askari, instrumento de Anglujo, trudis rekrutvarbadon al la malobeemaj Mesopotamaj enloĝantoj. Nun mi ĵus ricevis sciigojn el Mesopotamio, ke li estis devigata demisiĝi, ĉar ne nur la tuta popolo sed ankaŭ la parlamento kaj eĉ kelkaj el la ministroj tre vigle kontraŭbatalis la enkondukon de deviga rekrutvarbado. Estas tre interese, ke tiuj ĉi barbaraj sovaĝuloj malsukcesigas la planojn de brita imperialismo, kiu perforte volas enkonduki «felikiĝo» de la civilizacio en la formo de milita rekrutvarbado. Pli posta letero ĵus ricevita el mia korespondanto donas al ni alian eĉ pli senkuraĝigan raporton pri la eŭropa situacio: «Ni ĉiuj ŝajnas esti samopiniaj pri la tumulto de l'eŭropaj aferoj. Niaj opinioj estas malsamaj nur pri la demando, el kiu fumanta cindrujo plej frue kreskos la flamo, ĉar estas tro multaj...»

Ĝis nun mi ĉiam sentis, ke ne estos baldaŭ la danĝero de milito en Eŭropo — sentis ĝis la lastaj tagoj. Mi ne kredis, ke Rusujo kuraĝos batali ekstere de siaj landlimoj. Kaj mi sentis, ke se iu el la aliaj infektitaj lokoj eruptus, tiam la grandaj potencoj estus devigitaj tuj evitigi la militon. Se ne, iliaj propraĵoj komunistoj sukcese malpacigos la hejmlandon.

Sed tiu ĉi vidpunkto jam ŝanĝiĝis. La plano nun estas, piketi Rusujon, por ke ĝi deklaru militon. Tiam oni komencos krii: «Disfalu la ruĝa minaco», kaj la vorto «ruĝulo» an-

stataŭos la vorton «bosche» (germano), kiel nomo de ĉiu suspektinda persono. La kapitalistaj ĵurnaloj jam tre lerte preparis la popolojn, por ke ili kredu, ke ĉiuj liberaj kaj neortodoksaj individuoj estas «ruĝaj». Tial, se la faŝistaj organoj ekfuriozus, tiam neniam kontraŭstaro estus ebla kontraŭ la kruela detruo ne nur de la komunistaj, sed ankaŭ de ĉiuj pacifistaj, socialistaj kaj aliaj seriozaj organizaĵoj, kiujn la kapitalismo en sia histeria timo juĝos dangeŝaj.

Nia nuna tempo estas vere timinda! Laŭ mia opinio nur miraklo povas nin savi de la ĝenerala konfuzigo kaj galimatio, kiuj povos veni post malpli ol dekkvar monatoj. Tio estas freneza memmortigo, kiu anoncas la finon de okcidenta civilizacio. Por tiu ĉi eviti iu miraklo devos okazi. Mi ne povas kredi la facilan argumenton, ke ni estas tro malriĉaj kaj pro tio ne povos militi. Ĉiam estas trovebla mono por inferaj celoj. Se ni sukcesus trompi la popolon, ni trovus centojn da milionoj eĉ nuntempe. Iuj dirus, ke tiu ĉi artikolo havas alarmistan karakteron. Mi konfesas, ke mi ne volas fari alarmon; mi estas tiel indiferenta kaj malema rilate al la senhava, falsa kaj bagatela civilizo, ĉar mi devas multe pensi pri la maloftaj grandaj ideoj, kiuj aperas en la fremdaj landoj, kaj kunlabori kun la malmultaj grandaj homoj, kiujn mi konas, por evitigi la antaŭvidatan fatalan finon.

Estas malfacile por amerikanoj konsideri serioze tian alarman kriadon. Estus bone, tamen, memorigi, ke se tia alarmo estus donita je junio 1914, ĝi estus aŭskultita kun malatento aŭ moko. La ĉefa fakto por memori estas, ke hodiaŭ la samaj aferoj marŝas en Eŭropo, kiel en 1911, 1913 kaj 1914. Ni havas samajn aliancojn, samajn potencvilibojn, saman fabrikadon de armiloj, samajn timojn, malamikecojn kaj konfliktojn, samajn naciajn ambiciojn. Kio okazos baldaŭ? Neniu scias, kaj ĝuste tial estas tiom malkvietiga la situacio. Rilate al ni, ni ne kredas, ke la venonta

milito venos plej baldaŭ, ĉar Eŭropo ne ankoraŭ regajnis sufiĉan forton por sin ĵeti en konflikton ĝis morto. La historio de lasta jarcento montras sufiĉe klare, ke la militoj okazas je la intertempo de proksimume dudek jaroj. Sed estas bone memori, ke nun jam naŭ jaroj pasis post la lasta milito kaj dum tiu periodo la sekvanta milito estas duone preparita. Tiu ĉi venonta milito jam estas survoje kaj frue aŭ malfrue eksplodos. Kiel oni povas haltigi la tajdon, por ke ĝi ne okazigu katastrofon?

Tradukita el *Unity*.

K. N.

OOMOTO ĉe la Internacia Novidea Alianco

En la komenco de julio okazis en Londono la konferenco de The International New Thought Alliance (Internacia Novidea Alianco). Invitita de ĝia estraro, mi volonte partoprenis ĝin. Tiu ĉi asocio baziĝas sur la kristanismo kaj pere de ĝi celas amikiĝi la popolojn. La asocio havas plurajn filiojn en Anglujo, Irlando kaj Germanujo. La konferenco daŭris unu semajnon. La plej multo de la ĉeestantoj estis virinoj. Ili estis tiel multaj, ke mi demandis al la sekretarino F-ino Bradshaw, ĉu ĝi estas konferenco de virinoj? Mi kiel Oomoto faris paroladon antaŭ la konferencanoj, kiuj atente aŭskultis ĝin. Multaj el ili interesiĝis pri Oomoto, kio estas kontentiga afero, ĉar la Alianco estas pure kristanisma. Sed la oficiala lingvo estis la angla. La asocio sin nomas «internacia», sed per la angla lingvo mi dubas, ke ĝi povos facile disvastigi sian humanan ideon inter la aliaj pacifistaj laborantoj. Al la asocio unuankes komprenigilo, mankas Esperanto. Estas certe, ke la plimulto el tiaj movadoj adoptis jam Esperanton kaj nun kune batalas por la venko de siaj ideoj. Se la Internacia Novidea Alianco povus kunlabori per Esperanto kun la aliaj mondpaĉaj movadoj, ili prezentus de si mem pli grandan forton kaj influon.

K. N.

igi ŝin por momento, ĉar ŝi brulis en ama flamo.

Svafford: Kun tia malforta volo, kiel do vi povos servi por la realigo de la Dia plano: venigi Lian Regnon? Via volo estas malpli forta ol mi kredus. Ni, judoj, perdis nian landon antaŭ 2.600 jaroj kaj dise en la mondo estis mokataj kiel sennacianoj, sed post la senĉesa kaj longega suferado, ni reekposedis Palestinon, la sanktan landon donitan de Dio. Neniu judo havas tiel malfortan volon, kiel vi.

Vravasa: Mi tute hontas kaj trovas nenian vorton por respondi al vi. De nun mi restarigos mian volon kaj per la sola sincereco mi kulturos fervorecon kaj kuraĝon, ne malpli fortajn ol judoj posedas.

Svafford: Mi esperas, ke vi ne nuligos vian vorton donitan al Mario kaj, ke vi certe realigos vian promeson. Se vi trompus judinon, tio venigus al vi kiel ankaŭ al via religio gravan danĝeron kaj tial mi donas al vi sinceran konsilon. Verdire, depost via konatiĝo kun fraŭlino Mario, ŝi ekamegis vin kaj ĉiutage ŝi suferadis pro tio. Mi volis peri la edziĝon inter vi kaj ŝi, ĉar mi kompatis ŝin. Tial mi venis tien-ĉi antaŭ nelonge kaj hazarde mi aŭskultis vian dialogon. Nun mi petas, ke vi ne trompu ŝin. Si estas sincera kaj kuraĝega virino. Se vi rompus vian promeson, tio estus trompi Dion. Tiukaze malfeliĉaĵo vin trafus. Kaj nun vi donu al mi ankoraŭ foje vian decidatan vorton kaj tiam mi ordonos al fraŭlino Mario, ke dum 70 tagoj ŝi ne malhelpu vian animan ekzercon.

Vravasa estas konfuzigita, aŭdinte la postulon de la maljunulo kaj li suferadas en sia koro. Iom poste, pripensante, li decide diras:

Vravasa: Jes, mi certe plenumos mian promeson. Bonvolu do diri al fraŭlino, ke ŝi estu trankvila.

Svafford: Tiam mi certe kredas, ke vi estis fraŭlo en Hinode lando. En alia okazo, vi ne povus fari tian promeson eĉ ŝercante, eĉ se virino amas vin. Samkiel Mario, via eventuala edzino amas vin kaj sopiras pri vi. Vi estas propagandisto de Dia misio kaj vi certe ne farus tian malfidelecon.

(Vravasa inter du atakoj ne trovas vorton por respondi kaj pensas, ke li sin ĵetos en la maron de Galileo por eviti tiun-ĉi malfacilaĵon.) Tiam Svafford, laŭte ridanta «Hahaha!» diras:

Svafford: Eĉ se vi ĵetus vin en la maron de Galileo, via peko de mensogo neniel perdis. Kion do vi faros?

Vravasa: Jam neniu rimedo restas por eviti tiun ĉi malfacilan situacion, en kiun mi ne antaŭvidis, ke mi enfalos. Volinte eviti momentan suferon mi forigis Marion per trankviligaĵoj vortoj. Mi ja estas tre kulpas. Ah! Kanagara Tamaĉihaemase... Dio, pardonu min!

Kun larĝo en siaj okuloj Vravasa petis la pardonon de Dio. Kaj iom poste, kiam li sin levis, neniam maljunulo plu estis antaŭ li, nur la luno sendis siajn maldikajn radiojn tra la nuboj, brilante la tegmenton de la maljuna

preĝejo. Vravasa mirigite finis sian preĝon antaŭ la preĝejo kaj li revenis hejmen tra la sama vojo, plendante sian malsaĝecon. Tiamaniere, li malsupreniris la monton de Oliv-arboj al la Monaĥejo Hotelo.

(La maljunulo, kiu aperis antaŭ la preĝejo kaj kiu aspektis kiel Svafford, estis aĉaĵo de Dio mem, kiu intencis doni ekzercon al Vravasa. Tial li aperis en homa formo kaj admonis lin.)

**

Kiam Vravasa revenis ĝis la muro de la ĝardeno de Gecimane, li rimarkis, ke belulino rapidpaŝe proksimiĝas al li. Si estis kovrata per blanka, maldika vualo kaj ŝi havis altan maldikan korpon kaj tre blankan vizaĝon. Vravasa haltis kaj rigardis sin mirigite, ĉar li tre deziris scii, kiu ŝi estas. Tiam la virino senzorgeme alproksimiĝis al li kaj premante lian manon, ŝi diris:

«Ho, vi venas tre frue hodiaŭ! (1) Mi rapide venis tien-ĉi, pensinte, ke vi ankoraŭ estas sur la monto. Ĉu fraŭlino Mario jam revenis hejmen?»

Vravasa rekonis la voĉon de Sinjorino Salome kaj aŭdante la nomon de Mario, li maltrankviliĝis en sia koro pli ol antaŭe kaj iomete rugiĝis. Salome, premante lian manon pli kaj pli varme, diris al li:

«Vere, vi estas propagandisto, veninta el

(1) Rimarko de la tradukanto: *tre frue*, ĉar verŝajne jam estis mateno.

DEDIĈAĴOJ AL S-ro O. DEGUĈI

Okaze de Lia Reliberiĝo

En la lasta numero de Oomoto Internacia, mi anoncis pri la reliberiĝo de S-ro Deguči kaj mi petis al la legantoj verki gratulajn poemojn aŭ frazojn. Mi jam ricevis kelkajn kaj volas prezenti ilin al la Oomoto-Majstro en formo de bela libro. Nun tie ĉi mi publikigas unu aŭ du el ili. (K. N.)

Al la Majstro eminenta Sinjoro Onisabro Deguči

Vin, Dia Sendito, ni ĝoje salutas;
Vi venas al ni kun bel-evangelio:
Ĉar la miskredantojn vi ne persekutas
Kaj milda vi estas, vi, nova Mesio.

Vi ja ne aperas kun glavino minaca;
Vi, male, predikas sen ia perforto
Pri bela doktrino humana kaj pacu;
El vi nur aŭdiĝas la dolĉa divorto.

Kaj kiam vin homoj maljuste turmentas,
Simile al Kristo, sen vana admono,
Sen ia ajn plendo, vi brave silentas
Kaj ilin konkeras per via pardono.

Pro tio do ĉiuji, Zamenhofanoj,
Kun vi simpatias, miriga scianto,
Vi kiu, grandestro de l'Oomotanoj,
Vastigas pacamon dank' al Esperanto.

H. BOUCON.

Anney, la 24-an de Julio 1927.

Al Sinjoro Onisabro Deguči

Majstro!

Lumo de la Oriento, floro de la spirita vivo,
semo kaj semanto de la amo,

Mi gratulas vin, ĉar vi venke elvenis el la
ungegoj de la plej kruela, plej malsaĝa monstro,
kiu ankoraŭ ekzistas sur la tero.

Kaj mi gratulas la homaron, ĉar la monstro ne

silentigis, ne forrabis vin, ĉar la homaro povas esti
gvidata per via lume, povas ricevi viajn florojn kaj
nutri sin per la fruktoj de via amo.

Jen densaj nebuloj blindigas la homojn sopir-
antaĵn al libereco kaj feliĉo, altaj muroj de nescio,
de ĉirato, de malsaĝo baras la vojon al la floroj de
l' vivo kaj al la paradizaj fruktoj de la amo.

Do ĝoju la homaro kaj danke salutu vin!

Vi igas la homojn vidi tra la nebulojn, vi helpas
forigi la barojn kaj malfermi la paradizon, por ke
ĉiu homo partoprenu la universalan riĉecon kaj
trovu sur libera vojo sian propran feliĉon.

Mi salutas vin kiel princon sen krono, pli altan
ol ĉiuj princoj kronitaj.

HEINRICH NIENKAMP
(D-ro ERNST KLIEMKE)
Prezidanto de la Germana Esperanta Ligo.

Berlino, la 27-an de Aŭgusto 1927.

El la Parolado de S^{ro} La Bosse en Tokio

Hindujo havas historion de pli ol 5000 jaroj.
Antaŭ ol iu ajn alia lando ĝi jam faris grandan
progreson en la algebro, geometrio kaj astronomio.
Sed nun ĝi estas nenio pli ol angla kolonio. Kial?
Tio okazis pro diplomataj ludoj. En la komenco
de la 18-a jarcento l'Hindujo disiriĝis en pli ol
200 feŭdaj posedadoj apartenantaj al dukoj, kiuj
interbatalis inter si. Tiam angloj fondis la Orient-
hindan Kompanion, pruntedonis monon kaj sendis
armilojn al la interbatalantaj hindoj, de kiuj la
kompanio, kiel rekompenco, forprenis la tutan
landon, teritorion post teritorio. Dum la dukoj
reciproke malfortigis pro sia interbatalado, la kom-
panio pli kaj pli fortigis. Ĉeĵ jarojn poste, 70 jarojn
antaŭe de nun, ĝuste en 1875, la tuta Hindujo
subiĝis al la angla influo. Ne per milito, sed per
diplomatia, Britujo ekposedis Hindujon. Diplomatio
estas trompo aŭ mensogo. Post sia koloniigo l'Hin-
dujo tute ŝanĝiĝis. Koncerne la edukadon, antaŭ
la koloniigo 68% de la popolo kapablis legi aŭ skribi,
sed laŭ la ŝtata statistiko de 1920, tiuj personoj
multe malmultiĝis je nur 7%! Edukado estas ja

malpermesata al hindoj. Ili antaŭe kreis tiel grandan
nacion kulturon kaj filozofion, kiun eĉ la modernaj
filozofoj admiras kaj sopiras, sed nun ili estas mal-
klerigitaj kaj malfortigitaj.

La hindoj havis nacian industrion. Antaŭe ili
posedis preskaŭ la tutan komercadon de silko kaj
ŝpinajo en la mondo, sed tiuj ĉi entreprenoj estis
subpremitaj per tro da imposto aŭ eĉ detruitaj per
armiloj. Antaŭe la hindoj sendis siajn ŝipojn ne
nur al havenoj de la Suda Oceano sed ankaŭ al
Hispanujo. Ili nun ne havas eĉ unu ŝipeton. Tiam-
nere hindoj malriĉiĝis kaj malklerigis. Ili tiom-
procento plialtiĝis kaj ilia meznombra aĝo multe
mallongiĝis — je 23 jaroj. La hindaj policianoj
ricevas monatan salajron da unu pundo kaj duono,
dum la hinda vicreĝo ricevas 16.000 pundojn po-
jare. Ĉiujare 30.000.000 pundoj enfluas Anglujon el Hindujo
laŭ diversaj manieroj. Aliflanke, ĉiuj hindoj estas
devigataj militi por Anglujo kaj la duono de la tuta
enspezo de Hindujo estas uzata por la armeo. Sed
la hindoj estas ĉiam soldatoj kaj ĉiuj oficiroj estas
angloj. Nur en 1925 por la publika atako, la angla
registaro permesis, ke 9 oficiroj estu hindoj, kaj
tiuj ĉi armeoj konsistantaj tute el hindoj estas
sendataj aŭ al Sanĥajo aŭ al aliaj lokoj.

Kie estas la honestaj homoj nuntempe? Tiel-
nomataj « civilizitaj popoloj » faras nur malhonest-
aĵojn. Por fariĝi vera homo estas necesa dieco.
Nur per la kreskigo de la homa koro en dieco kaj
per Dia volo oni povas forigi ĉiujn malbonojn. Tiu
ĉi ideo, laŭ mia opinio, unue aperis ĉe l' aziaj
popoloj. Ĉiuj spiritaj granduloj aperis en la Oriento,
ĉiuj grandaj religioj fondiĝis en la Oriento: krist-
anismo, mahometanismo, budhismo... En la karak-
tero de la aziaj rasoj la vera spiriteco flamas kaj
vivadas. Mi kredas, ke la Oriento naskos grandan
homon, kiu gvidos la tutan mondon en la estonteco.
La blankaj popoloj vundis aliajn rasojn per sia
civilizo kaj ili mem pro tio degeneris.

La aziaj popoloj, kiuj havas grandan taskon
resanigi la tutan mondon, devas unue resanigi la
azian kontinenton.

Jam sub diversaj nomoj aperis en Azio diversaj
spiritaj movadoj, kiuj ĉiuj havas komunan celon:
resanigado. Ni devas klopodi energie resanigi la
tutan mondon sub la spirita gvidado de la mondo.

Tradukis K. N.

Hinode Insullando. Via famo estas tiel granda,
ke ĉiuj jam scias iom pri vi en tiu-ĉi urbo Jeru-
salemo.

Mi tre petas, ke estu permesate al mi ĉesteti
en la rondo de tia populara persono, eĉ se nur
dum kelkaj minutoj. »

Vravasa: Ĉu vi ne estas Sinjorino Salome?
Kiel grandan ŝercaĵon vi diras, nekonvenan
al la nobela virino, kia vi estas! Bonvolu ne
nun ĝeni min per via humoro! Vi estas vere
lerta en petolado...

Salome: Ohohoho! Estas vi, kiu lerte pe-
tolas! Viroj ĝenerale ludas kun fraŭlinoj kva-
zaŭ kun pupoj kaj amo de virino estas porvivo.
Virino emas gravediĝi kaj pro tio ŝi amas por
sia tuta vivo. Virino ne amas pro petolo, nek
por volupto. Kaj tial mi petas, ke vi amu
fraŭlinon Marion por ĉiam. Se vi rompous la
promeson, kiun vi faris al ŝi, vi devos esti
atentema, ĉar judoj estas tre solidaraj kaj oni
ne povas scii antaŭe, kion ili faros kontraŭ vi.

Vravasa: Mi tre dankas pro via konsilo.
Mi ne ankoraŭ faris firmam promeson, sed nur
jes antaŭe mi finis la preparon por tio al fraŭ-
lino Mario. Mi ne komprenas, kial ŝi volas ami
min! La monto de Olivarbo estas sankta loko
kaj Dio volis provi mian karakteron transform-
ante sin en Mario. Tiu ĉi loko estas vere sankta
sed samtempe timinda. Ĉu vi intencas nun sur-
montiĝi sola? Mi miras pri via firma kredo.

Salome: Mi nur vizitadas tiun ĉi monton
por vin renkonti tie. Sed se vi volas reveni

hejmen, mi ĉesos la surmontiĝon kaj mi akom-
panos vin al via hotelo. Mi ne intencas postuli
amkontrakton de vi, ĉar vi estas kaprica. Estu
trankvila! Ohohoho!

Vravasa: Sinjorino! Jam ĉesu vian petolad-
on kun mi. Vi estas vere malbonkora, nedeca
por nobelulino.

Salome: Sed tamen, estus por vi pli agreeble
promenadi kun mi ol kun araba laboristo, ĉu
ne?

Vravasa: Jam sufiĉas la serĉo! Bonvolu
lasi min sola. Aj! Mia fingro estas preskaŭ
paraliziginta.

Salome: Eble via fingro doloras nun, sed vi
ne sentus doloron, eĉ se oni tranĉus du aŭ tri
fingrojn por fraŭlino Mario! Kaj vi havas mal-
agrablan senton, kiam mia mano tuŝas vin...
Sed mi ankaŭ estas pretendema kaj ne estos
venkita en la konkurso kun fraŭlino Mario!
Vi decidu: Veninta tien-ĉi de tiel malproksima
kontinento, vi estas amata samtempe de du
virinoj kaj pro tio vi povas vin konsideri vere
feliĉega! Ohohoho!

Vravasa: Mi ne satas vian ridmanieron:
« Ohohoho ». Ĉu vi intencas ludi kun mi? Oni
vere ne povas esti sufiĉe singardema kontraŭ
gejudoj!

Salome: Pro tio ke vi ne povas esti mal-
singardema, tial mi estas judino (1).

(1) Rimarko de la tradukanto: « Judan » signifas
en japana lingvo « malsingardema », la japana vorto por
judo estas « judajzin » kaj la ĉi supra frazo estas vort-
ludo de Sinjoro Deguči en la japana originala teksto.

Vravasa (parolanta en si mem): Tiu ĉi
virino estas stranga; eble ŝi estas diablo. La
vera Sinjorino Salome ne povus eldiri tiajn
maldecajn vortojn. Eble malbona vulpa spirito
volas min allogi. Ĝis nun mi nur estis admon-
ata de Dio mem sur la Olivarbo monto kaj
tial mi nun devas esti singardema. Vravasa
salivis siajn brovojn per sia fingro (1).

Salome: Sinjoro! Vi nun intencas min
moki, salivante viajn brovharojn; mi ne estas
vulpo, nek melo, sed mi estas la vera Salome.
Ne eraru do!

Vravasa: Eĉ se vi lertege vin transformis,
vi malsukcesos! Mi ne povas esti allogata per
tiaj ruzoj, ĉar mi estas dia propagandisto, sendi-
cia speciale el Hinode Insullando. Kaj nun,
rigardu, mi malkaŝos vian veran karakteron.
Vi, vulpaĉo!!!

Kriante la lastajn vortojn tiel laŭte, kiel
sonas tondrego, Vravasa admonis ŝin. La ŝajna
Salome laŭte ekridaciis: « Ohohoho » kaj don-
ante signon de moko per sia jupo, ŝi transformi-
ĝis je blanka vulpo kaj svingante sian voston,
la besto malrapide foriris.

Vravasa, tremante pro la ekscito, rapide
iris al la Katolika monaĥejo kaj sin kuŝis sur
sian liton.

(1) Rimarko de la tradukanto: Laŭ japana popol-
kredo, posedata vulpspirito kalkulas la brovharojn
kaj oni povas liberiĝi de ĝi, salivante la brovharojn
per la figuro.

Universala Homama Asocio

La Universala Homama Asocio havas sian sidejon en Kameoka (Japanujo) kaj ŝuldas sian fondiĝon al Majstro Onisabro Degučĉi, kies amo al la homaro estas varma kaj profunda.

La asocio propagandas, pere de siaj anoj, la veran bonon inter la homoj en la tuta mondo kaj klopodas planti la amon en iliaj koroj. Tiamaniere la asocioj esperas komprenigi al la mondo la neprajn homajn devojn, kiuj estas bezonaj por la plibonigo de la vivo.

La asocioj posedas nek monvaloraĵajn akciojn, nek kapitalon, nek iun ajn komercan celon. Ĝiaj asocioj estas la tuta homaro, ĝiaj akcioj kaj kapitalo estas amo, vero kaj bono, kaj ĝia celo estas plena kaj ĉiurilata interfratiĝo de la homoj en la mondo.

Ĉe la nunaj cirkonstancoj, la homa koro estas konsternita de la okazintaĵoj tra la mondo, kiuj alvenas unu post alia. Ilia karaktero estas tiel komplika kaj ili tiel ofte kontraŭdiras sin reciproke, ke la homa koro ne povas distingi la bonon de la malbono en ili. Certe, tiu situacio influas malbone la koron kaj ĝi, kvankam bona, iom post iom malboniĝas. Nuntempe ni vivas en la moderna epoko, kies vivstato estas tute malsama de la mezepokaj kaj antikvaj tempoj. La nunan tagon regas la civilizacio, kiel ni pretendas. Se ni penetras pli profunde en la utilojn, kiujn donas al ni tiu civilizacio, ni konstatus, ke preskaŭ la duono el ili estas veraj malutiloj. Ni ne citu ilin. La observema okulo spertas tion en nia ĉiutaga vivo. La komplikaĵoj de la nuna civilizacio vere nin embarasas, sed, ni toleras, ĉar ĉiu objekto obeas la forton de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi troviĝas. La Politika Ekonomio instruas, ke la kultura vivo postulas pli kaj pli da bezonoj por la individuo. Intertempe, ni diros, ke ni ne kontraŭstaras la civilizacion kaj kulturon, sed ni devas preni el ili nur la bonon kaj utilon, por ke ni eliru el tiu-ĉi, malgraŭ ni, malbona stato. Ĉiuj kvalitoj estas nuntempe treege relativaj, sed ni esperu, ke tiu-ĉi granda relativeco preskaŭ malaperus, se ni atingus la epokon, kiam la interkompreniĝo kaj la interfratiĝo regos la mondon.

Por kontentigi la postulatajn bezonojn de la kultura vivo, ni devas havi rimedojn. Oni povas vere diri, ke la homa zorgo kaj okupo celas nur atingi materialajn rimedojn kaj la homo tute forgesas zorgi pri sia animo, malsatigas ĝin kaj pro tio la homa koro suferas. Amo, vero kaj bono! Kiaj simplaj vortoj? Ili mankas al ni. Tiuj-ĉi tri vortoj posedas la bazon, sur kiu devas evolucii la homaro kaj tiam ni portos fiere kaj senkonfuzo la nomon « homo ». Ĉiuj objektoj en la Universo reprezentas la Grandan Dion. La homo meritas esti Lia plej altgrada riprezentanto, ĉar la noblaj kvalitoj, kiujn li heredis de siaj pra-

avoj, distingas lin, kiel superulon en la mondo, kompare al aliaj kreaĵoj: bestoj, birdoj kaj kreskaĵoj. Per sia spirita potenco la homo povas harmoniigi la vivon tiamaniere, ke finfine oni ĝuos la fruktojn de vera interfratiĝo de la homaro; la paradizo estos preta eĉ sur la tero.

Sed nun, la homa saĝeco anstataŭ agi kun amo, vero kaj bono, produktas rimedojn, por nuligi la ekziston de siaj fratoj, kiuj havas la saman rajton vivi kun ili. Dio donis neniam la rajton al la homoj, por ke ili mortigu unu la alian, sed Li donis al ili la amon, la veron kaj la bonon. Tiuj-ĉi tri posedindaj virtoj estas profunde profanataj de ni, la homoj. Ni konsideras neniam ilin. Tiu malkonsidero provokas la haŭson kaj la malkomprenon inter la homoj kaj, se tiu-ĉi nehoma situacio daŭros longe en la estonto, la mondo malrapide, sed certe marŝos al perejo.

Aliflanke, ni ne forgesu, ke ekzistas la okcidenta kaj orienta popoloj, kies kulturoj tute diferencigas. La okcidenta kulturo komencis enpenetri jam de post kelkdekoj da

Hellin (Hispanujo), Roma kaj Udine (Italujo), Pfulligen (Germanujo), Niemes (Ĉeĥoslovakujo), k. t. p. La multenombraj riprezentantoj de U. H. A. troviĝas en la tuta mondo. Por ilia vigla kunlaborado, ili meritas la sinceran dankon de U. H. A.

Oni povas aligi al U. H. A. tute libere kaj sen formalajoj. La memvolaj donacoj de la helpmembroj subtenas la vivon de la asocio.

U. H. A. adoptas varme Esperanton, kiel internacia helplingvon. Jen la unua paŝo, kiun faris la fondintoj de U. H. A. por la interfratiĝo de la homoj.

Ĉiuj lokaj organizaĵoj de U. H. A. estas liberaj fari siajn statutojn, kiuj bezonas la aprobon de la respektiva U. H. A.-oficejo.

Por realigo de U. H. A.-celo, la asocio eldonas diversajn propagandilojn kaj okazigas paroladojn. La asocio sendas propagandistojn en ĉiuj partoj de la mondo laŭbezono.


Estas notinde, ke U. H. A. aranĝis sian unuan kongreson en Kameoka, Japanujo, je la 18-a aprilo 1926.

La devoj de U. H. A. membroj estas: respekti ĉiujn sincerajn kredojn kaj opiniojn de la asocio kaj ili devas klopodi por la realigo de la alta celo, pere de la programo, atingi la regnon de la amo kaj bono.

Ĉiu membro de la filioj provizore ricevos « O. I. » senpage kaj diversajn literaturaĵojn per 30 procento da rabato.

Jen, per iom da vortoj, la klarigo pri Universala Homama Asocio. Ĉiu interesiĝanto, kiu deziras detale sciigi pri ĝi, povas mendi kaj legi la diversajn propagandilojn, kiujn eldonas U. H. A. en Kameoka (Japanujo) kaj en Parizo (Francujo).

V. M. ŜISKOV.



La XXII-a Skota Kongreso de Esperanto, Ayr, 3-an de Junio 1927

jaroj la orientajn popolojn. La diferenco inter ambaŭ kulturoj ne povas ne provoki iun konflikton, kiu estos treege danĝera por la paco de la homaro. Eĉ ni havas jam ekzemplon: la ĉina milito. Finfine ĉiuj homaranistaj organizaĵoj, konsiderante, ke sur la tero ekzistas egalrajtaj homoj de ĉiuj rasoj kaj popoloj, devas preni la taskon por eviti tiun-ĉi estontan konflikton. La Universala Homama Asocio, en la nomo de la homaranismo, sin ŝarĝis per tiu-ĉi tasko, ĉar la homaranismo estas la sola rimedo, kiu povos eviti tiun konflikton, savi la mondon, kaj doni la pacon al la homaro.

Ni esperu, ke venos la tempo, kiam oni komprenos la veran signifon de la homaranismo: ami sian fraton, fari bonon al li kaj plenumi la volon de la Granda Dio, kiu estas amo, vero kaj bono.

Por tiu realigo vigle kaj sindoneme laboras U. H. A.

La centra sidejo de U. H. A. troviĝas en Kameoka (Japanujo), kiel ni menciis. Laŭ la statutoj oni povas fondi lokajn oficejojn en ĉiuj partoj de la mondo. Sur tiu bazo estas fondita la *Eŭropa Centra Oficejo*, kiu havas sian sidejon en Parizo. Sub ĝia gvidado estas la filioj de U. H. A. en Eŭropo, ekzemple en

Ĝisnuna Rezultato de nia "Grava Anonco" (N° 19)

Kiel rezultato de nia peto al niaj legantoj koncerne la dediĉaĵojn al S-ro O. Degučĉi, okaze de lia definitiva liberiĝo, ni ricevis kun danko ĝis nun de jenaj Sinjoroj:

- H. Boucon, Annecy, Francujo;
- Ruda Beneš, Zelezny Brod, Ĉeĥoslovakujo;
- Simon Franz, Paris, Francujo;
- Doktoro Josif, Caracal, Rumanujo;
- Kazis Vidikanskas, Philadelphia, Usono;
- Teo Jung, Horrem b. Köln, Germanujo;
- Dr. Ernst Kliemke, Berlin, Germanujo;
- Antonio Kudela, Olomouc, Ĉeĥoslovakujo;
- Vasil M. Ŝiskov, Paris, Francujo;
- Rudolf Burkert, Niemes, Ĉeĥoslovakujo;
- F. A. Goodliffe, Horsham, Anglujo;
- Josef Major, Paris, Francujo;
- Dočo T. Stanev, Sevelievo, Bulgarujo;
- Leon Zamenhof, Warszawa, Polujo;
- Kreibich Emil, Kladno, Ĉeĥoslovakujo;
- Aimé Sandelyon, Lyon, Francujo;
- Georgi Donĉev, Tirnovo, Bulgarujo;
- Michelis de Rienzi, Paris, Francujo;
- Raymond de Rienzi, Paris, Francujo;
- Stojan Djudjev, Panagjuriste, Bulgarujo;
- Ivan Kirov, Sliven, Bulgarujo.

Ĉiu leganto estas petata sendi al ni ĵan dediĉaĵon en la formo de poemo, kanteto aŭ gratulaj frazoj, kiujn ni akceptos kun plej sincera danko.

LA REDARTEJO.

TAKATERU KITAMURA.

Morto de Fraŭlino Hihumi

La kvara filino de S-ro O. Degučĉi mortis la 24-an de marto je la aĝo de 16 jaroj. Ŝia vivo estis mallonga, sed tre bela. Ankaŭ ŝia morto estis bela kaj tial ni ne povas lasi ĝin sen raportoj. Ŝi estis tre sana kaj forta en la komenco de sia vivo. Okazis en 1923 jaro, ke ŝi enliĝis pro malsano kaj dum la lastaj kvar jaroj ŝi suferis pro malsanoj: pulmaj, diafragmaj, renaj kaj ankaŭ pro kronika intesta kataro. Ĝenerale, kiam la homoj malsaniĝas, ili deziregas resaniĝon baldaŭan, sed estis alie kun ŝi. Kiam ŝi havis ekatakon de malsano, ŝi ne tiel simple deziris resaniĝon. Kontraŭe, ŝi volis malsaniĝon, kaj eĉ petis al Dio suferon. Kial ŝi ne timis malsanon? Tie-ĉi estis ŝia propra konvinko, kaj kredo.

Lun tagon de tiu jaro io eniris en ŝian maldekstran okulon. Ĝi ne estis polvo, ĝi estis figuro de virino — proksimume 24 aŭ 25 jara kudranta, kaj samtempe la Fraŭlino malsaniĝis pro la pulmkataro. La kudranta virino, kiu troviĝis en la okulo estis ja spirito de mortlino pro pulmkataro. Nun la Fraŭlino interparolis kun la spirito.

F-INO: Kial vi eniras en mian okulon subite kaj malsaniĝas min? Tuj foriru!

SPIRITO: Bonvolu senkulpigi min! Verdire, mi estas spirito, kiu suferigis iun personon, pro kies morto mi perdis loĝejon kaj venis al vi. Sed mi tre suferas enloĝe en via korpo, precipe, kiam vi ricevas dian metodon de resaniĝado «Cinkon». Mi netolerable suferegas kaj tial mi volas foriri.

F-INO: Kien vi iros?

SPIRITO: Mi jam havas nenian loĝejon kaj mi trovas bonan homon, en kiu mi loĝos. Neniu rimedo estas por mi agi alimaniere.

F-INO: Kaj ĉu vi intencas malsanigi tiun homon ankaŭ?

SPIRITO: Jes. Ĝis nun mi malsanigis tiamaniere kelkajn personojn kaj ilin mortigis.

F-INO: Se vi intencas malsanigi aliajn, vi restu ĉe mi. Mi ne permesas al vi suferigi alian personon.

Kaj tiamaniere la interparolo finiĝis.

La spirito tamen post nelonga tempo foriris de la korpo de la Fraŭlino, eble pro timo de ŝia spirita nobleco kaj ŝi unufoje resaniĝis. Ŝi ĝuis sanecon proksimume unu jaron, sed ŝi emis malsaniĝi. Iam ŝia patrino, edzino de S-ro Degučĉi, diris al ŝi:

— Mi esperas, ke vi baldaŭ resaniĝos. El miaj ses filinoj nur vi malsaniĝas, pro kio mi tre bedaŭras kaj vin kompatas.

— Ne! Mia malsano ne gravas. Se mia patro aŭ patrino malsaniĝus tio estus treege grava, ĉar ili devas servi al la Dia afero kaj estas neniuj, kiu povus ilin anstataŭigi. Tial mi ĉiam petis al Dio, ke mi suferu pro malsano anstataŭ miaj gepatroj. Kaj mi neniam suferas pro mia malsano; nur mi bedaŭras, ke ĉiuj parencoj kaj amikoj tre zorgas kaj suferas pro mi.

Ŝi ekkonis la gravecon de la flegado de malsanuloj deŝi malsaniĝo. Ŝi diris:

— Oni ne povos doni, vere, kontentigan flegadon, se oni mem ne havis sperton de malsano. Mi jam delonge gardas la liton kaj tiom pli multe mi sentas tion. Post mia resaniĝo, mi volus fariĝi flegistino por Oomoto-kredantoj.

Kaj tial ŝi pruntprenis de sia flegistino diversajn librojn rilate la flegadon kaj ilin zorgeme studis, pro kio ŝi bonege komprenis ĝeneralan aferon de fiziologio kaj higieno kaj ankaŭ diversajn metodojn de flegado. Poste ŝi povis ekzameni sian pulsbaton, ekkoni la alproksimiĝon de la morto kaj per tio ŝi preparis sin.

Lastan jaron ŝi diris la jenan aferon:

— Mi sonĝis, ke el la tombejo de Sankta Patrino Nao Degučĉi (fondintino de Oomoto kaj avino de la

suferanta Fraŭlino) allugis al mi ruĝa fajra pilko, kiu tamen subite ŝanĝiĝis je la fondintino mem, kaj ŝi diris al mi, kun milda amplena vizaĝo: «Vi devas vin oferi por Dia servado».

Poste ŝi diris:

— Mi volas fariĝi propagandistino por propagandi la Dian mision. Ĉu la virinoj povas ankaŭ esti propagandistoj?

Kaj ŝi provis sin vestiĝi per propagandista vestaĵo.

Lastan januaron ŝi havis alian sonĝon, en kiu anĝelinoj aperis por ŝin bonvenigi en la ĉielo. Ŝi rakontis jene:

— Preskaŭ cento da anĝelinoj; ĉiuj dekkvin aŭ dekse jaraj, vestitaj en blankaj survestoj kaj ruĝaj vipoj, kun hararoj pendantaj min ĉirkaŭis en du vicoj, en gaja humoro, min invitis per siaj manoj kaj dancis ĝoĝege, kvazaŭ papilioj kiuj surflugas la florojn. Mi treege volis aliĝi al ili kaj pro tio mi rapide iris al la banejo kaj faris mian tualeton, sed la fotografisto, kiu ankaŭ ĉeestis por fotografi la belajn anĝelinojn diris al mi, ke dum mia tualetado la anĝelinoj ĉiuj foriris, kaj pro tio mi treege bedaŭris. Sed tio-ĉi estis nur sonĝo.

De la lasta novembro ŝi ne povis preni sufiĉan manĝaĵon kaj pro tio ŝi pli kaj pli malfortigis kaj estis malfacile por ŝi stari aŭ moviĝi. Malgraŭ ke ŝi estis treege malsana, ŝi ĉiam malsupreniris unu etaĝon, apogante sin sur alia persono kaj tiamaniere ŝi fariis siajn naturajn bezonojn ekster ŝia ĉambro ĝis la morto. Dum la nokto, eĉ kiam ŝi ne povis dormi pro suferado, ŝi trankvile fermis siajn okulojn, nur por ke la flegistinoj povu dormi; tial ili rakontis, ke la fraŭlino estis tre malkaprica malsanulo, kiam ili neniam antaŭe vidis. Iam ŝia patrino diris al ŝi, ke estas tre feliĉe, ke ŝi povas tiel bone dormi. La filino respondis:

— Mi ne dormas, mi ĉion konaŝ, kio okazas ĉirkaŭ mi. Sed la flegantoj devas dormi dum la nokto, se ili ne havos bonan dormon, tio malhelpos ilin dum la tago kaj tial mi ŝajnis min dormanta.

Estis same kun ŝia manĝado. Por doni trankviligon al ili, ŝi venigis sian patrinon kaj manĝis per tuta forto, pro kio unufoje ŝi preskaŭ svenis. Ŝi ĉiam trinkis eĉ unu tason da akvo kun elkora dankemo al Dio. Kvar tagojn antaŭ ŝia morto, ŝia kuzeto du jara mortis post dek tagoj da malsano. La avino, patrino de la fraŭlino, tiam zorgis la infaneton, kies malsano estis tre grava, sed nia fraŭlino, kiu ĉiam antaŭe tre sopiris pro sia patrino nek unufojon alvokis ŝin al sia ĉambro dum la malsano de sia kuzeto.

Morgaŭan tagon de la morto de la infano, la patrino de la fraŭlino vizitis ŝin por ŝin informi pri la malĝoja okazintaĵo. Tiam la fraŭlino diris:

— Mi jam scias, ke mia kuzeto mortis.

— Kiu raportis al vi tion?

— Neniu. Hieraŭ io venis al mia menso.

— Sed vi ne malkuraĝiĝu! Via kuzeto vin anstataŭigis, mortinte. Vi estos savita, kuraĝiĝu!

La fraŭlino ekpensis iom.

Kaj demandis:

— Kion vi diras?

— Ĉu la kuzeto mortis anstataŭ mi? O tion mi ne ŝatas. Mi ne volas esti savita per morto de alia persono.

La 23-an de marto, antaŭan tagon de ŝia morto, ŝi demandis al la ĉefkuracisto:

— Ĉu mi resaniĝos?

La demando estis subita. La kuracisto konfuziĝis, ĉar ŝia resaniĝo estis dubinda el kuracista vidpunkto. Pro embaraso li klinis sian kapon. Ŝi tuj rimarkis la konfuzigan mienon de la kuracisto kaj ekkonis la alproksimiĝon de la morto kaj diris al sia patrino:

— Mi mortos. Mi demandis al la kuracisto, kiu faris malesperan mienon.

— Ne! ne! eĉ se la kuracisto malesperas rilate al via resaniĝo, vi povos vin apogi al la Dia potenco kaj tial ne estu malkuraĝa.

Dudekvaran de marto, tago de ŝia morto, venis.

Matene ŝi diris:

— Dum la hodiaŭa tago mi mortos.

Sed la personoj ĉirkaŭ ŝi neniam tion kredis, kaj ŝia patrino ekploretis. Rigardante tion nia fraŭlino diris:

— Neniuj ploru! Neniu ploru, ĉar mi iros al tre bona loko.

Tion dirante, ŝi kombis siajn harojn, lavis sian vizaĝon kaj manojn, petis al la aliaj viŝi ŝian korpon per alkoholo kaj ĉiamaniere sin preparis. Ŝi metis brakhorloĝon kaj ringon, kiujn ŝi tre ŝatis kaj eĉ korektis la montrilojn de la horloĝo, aspektante tre kontenta. Alproksimiĝas la deka horo de la nokto.

— Miaj okuloj nebuliĝas, eble pro la lampo, bonvolu ŝanĝi ĝin!

Sed la lampo ne estas la kaŭzo.

— Miaj okuloj pli kaj pli forte nebuliĝas. Jam mi ne povas distingi la objektojn en iliaj detaloj nur la formojn mi rimarkas.

Ŝi ekzamenas sian pulsbaton kaj komprenas sian tujan morton. Venigas siajn gepatrojn kaj fratinojn, etendas sian manon, manpremas ilin, unu post la alia, adiaŭas pro la foriro el la reala mondo, kaj diras al sia plej aĝa fratino:

— Mi iras al la plej bela loko kaj mi petas, ke vi ne ploru.

Al siaj gepatroj ŝi diras:

— Mi tre dankas pro via longa zorgado kaj flegado. Nun mi iros.

Kaj ŝi fermis siajn okulojn.

Tiam estis tri kvaronoj post la deka horo. Tiamaniere, nia juna fraŭlino mortis. Kian belan sintenadon ŝi montris dum sia vivo! Ŝiaj noblaj dirajoj kaj agoj ĉe ŝia morto ne estas imiteblaj de ordinarnaj homoj.

Ŝi estis nature ĝentila kaj amplena, sed ankaŭ tre gaja kaj saĝa. Precipe, ŝiaj pensoj estis riĉaj kaj ŝi estis tre lerta je la farado de artikoloj kaj poemoj. Ŝiaj verkoj estas multaj. Eble mi havos la okazon prezenti ion al niaj legantoj. Ŝia funebro okazis la 27-an de marto. Oomoto tute ne sciigis al aliaj personoj pri ŝia morto, sed tamen ŝiaj kunlernantinoj kaj samkredantoj amase partoprenis la funebrojn kaj la akompanantaro kuŝe kun la bela vetero, kiu kvazaŭ laŭdis ŝian belan karakteron, donis al la proceiso solenan aspekton.

(Esperantigis K. N.)

SUR MARO ŜAŬMANTA...

Sur maro ŝaŭmanta

Naĝadas ŝipeto;

Ĝin gvidas brilanta

La verda stelo.

Kuraĝaj maruloj

Remadas konstante,

Obstinaj gajuloj

Laboras kantante.

Kaj ondoj kelere

Senfine bruegas,

Sed ĉiam fiere

Ŝipet' rapidegas...

Ni, same, kuraĝe

Antaŭen iradu!

Fidelaĵ, ni saĝe

Sen tim' bataladu!

Kaj fratoj amataj,

Kun nobla fiere

Ni venkos, helpataj

De l' sankta Espero!

KORBO DA PERLOJ ⁽¹⁾

La 20-an de julio 1900, Sinjoro (Sinjoro O. Deguč) intencis viziti sanktan lokon kuŝantan sur insuleto en la Japana Maro. Dudek unu disĉiplojn li prenis kun si elirante el Oomoto teritorio. Survoje li vizitis la hejmon de Keitaro Kinoŝita. En tiu momento anĝelo venis al la Sinjoro dirante, ke Dio volas provi la disĉiplojn. Tial dum la marvojaĝo telfestope eksplodis kaj la ribeliĝantaj ondegoj minacas pereigi la ŝipon. Fidante al Dio vi ne timu kaj marŝu antaŭen, ĉar Dio vin gardos. La Majstro skribis la nomon de Dio sur kvardek folioj de papero, kiuj estis alportitaj je lia peto. Disdonante la foliojn li diris al la disĉiploj enpoŝigi kaj konservi ilin. La disĉiploj ĝoje metis la paperon en la poŝon. Kune ili iris al la ŝipraparejo en la haveno de Maizuru kaj dungiĝis kvar ŝipetojn kaj kvar remistojn. Tiam la ĉielo tute nigriĝis; venis vento kaj pluvo kaj la kvar remistoj timis la grandan ondon kaj ĉiuj revenis hejmen rifuzinte iri plu.

Sinjoro diris al la estro de la ŝipluejo, ke se li sukcesos prepari la ŝipojn kaj dungi la maristojn ĝis la 9-a horo de la vespero, ili certe povos veturadi sen danĝero. La mastro obeis kaj el okcidentaj ŝipistoj de la vilaĝo li elektis la kvar plej kuragaĵn. Antaŭ la forveturo la mastro de la ŝipluejo tial parolis al la maristoj: « Tiu ĉi sinjoro estas vera misiisto de Dio, ĝis nun li dufoje iris al la Insuleto kun la fondintino de sia religio. Irante kun tiu ĉi respektinda persono vi ne timu ventegon kaj uraĝon, sed kuraĝe remu al la celo ».

La ŝipistoj fidantaj al la mastro rapide prepariĝis por ekveturo. Dum Sinjoro vespermanĝis kun siaj disĉiploj. La ŝipistoj maltrankvilaj por la ĉiam malboniĝanta vetero vane perdis tempon en preparado, kaj tial la horo de la forveturo forŝoviĝis ĝis la 10-a vespere. La disĉiploj enspiĝintaj legadante preĝvortojn baldaŭ atingis la altan maron. Nun subita ventego ekblovis kaj la ondegoj ek-kreskis. Sinjoro, malgraŭ sia volo endormiĝis por kelka tempo. Subite oni lin vekis per laŭta voko: « Sinjoro! Sinjoro! » Malferrante siajn okulojn la Majstro vidis la orientan ĉielon tute kovritan per nuboj, inter kiuj kelkaj estis pli ruĝaj ol fajro. La uraĝo eksplodis per elementa forto kaj la malforta ŝipo estis minacata per detruo. La furioza vento skurĝis la ondojn kiuj atingis la altecon de monto. La ŝipeto, en kiu ili estis flugis, de montopinto al valo, simile al pilketo. La kuragaĵ ŝipistoj volantaj montri sian spertecon streĉis sian lastan forton sed vane... La dudek unu disĉiploj, ĉiuj paliĝis kaj ili aspektis tute senvivaĵ por teruro. Unu el ili vokis al la Majstro en mizera voĉo: — « Sinjoro, ni jam mortos, bonvolu preĝi al Dio por pardono! » — Tiel la disĉiploj tremantaj veadis. Sinjoro ridetanta dum kelke da tempo observis la vizaĝojn de siaj disĉiploj kaj komplete Li ekparolis: « Vi estas jam en la profundaĵo de la abismo de la pekoj. Kial vi do ne timas tiun maron de peko kaj timegas la malprofundan maron? Vj estu trankvilaj, baldaŭ vento kaj ondo laciĝos ». Ekstarante je la pinto de la ŝipo la Majstro donante signon per sia ventumilo diris: « Trankviliĝu, vento ».

Kvazaŭ je bato de sorĉa bastoneto, la uraĝo malsovaĝiĝis. La ŝipistoj mirigitaj diris, ke tiu ĉi homo estas eksterordinara. Depost kiam ni migradis tra la maroj, hodiaŭ la unuan fojon ni spertis tian teruran tempeston kaj la unuan fojon ni malesperis por nia vivo. Estas do mirinde, ke la maro kaj ondarob obeis la ordonon de la Sinjoro. — Tiel bona ŝipistoj laŭdis la Dian povon de la Sinjoro. Nun la disĉiploj ankaŭ miriĝis je la miraklo. Inter la disĉiploj troviĝis unu kun malgranda kredo, kiu tiel multe timis la pereon, ke li kaŭris en la profundaĵo de la ŝipo. Sinjoro admonante lin diris, ke homa vivo similas veturadon sur maltrankvila maro.

Nia vivo estas regata de la sorto. Homaj korpoj estas en danĝero. Se ekzemple nun mankas al nia ŝipo direktilo kaj ŝipistoj, vi ĉiuj estus perditaj. Homoj ankaŭ estas tiel; ili perdas sian vivon sen Dio kaj sen kredo. Dumtempe la kvar ŝipetoj sukcesis albridiĝi al insuleto. La disĉiploj kaj la ŝipistoj ekmanĝis sian matenmanĝon. La disĉiploj estis ĉiuj fieraj kaj ĉiuj hontis paroli pri la timo pasinta. Unu el ili, Takezo Nakamura, honeste konfesis la terurojn de la vojaĝo dirante: « Dum la vojaĝo mi rimarkis malantaŭ nia Sinjoro malbonaspektan spiriton starantan kaj mi timis pro la okazajoj ».

Sinjoro respondis: « Tiu ne estis malbona spirito sed Ĉefanĝelo de la Tero, kiu nin gardis ».

La bona disĉiplo trankviliĝis je tiuj vortoj kaj li rekonis la favoron de Dio. Alia disĉiplo Seĝiro Murakami diris: « Dum la fortega vento mi rimarkis tri paperpreĝilojn (uzatajn en Ŝinto-temploj); ili falis el la ĉielo kaj haltis sur nia ŝipo. Tiuj devis alporti la Dian helpon ».

Dum la revena vojaĝo ni kunigis du ŝipojn formante du paroĵn el la kvar. Farante velojn el matoj de riza pajlo ni ekvojaĝis, sed denove ni renkontis teruran tempeston kaj la ŝipoj estis preskaŭ renversataj. Kiel antaŭe, Sinjoro admonis la spiriton de la maro, la vento trankviliĝis kaj ni sendanĝere alvenis al haveno. El Oomoto teritorio de Ajabe du fratroj venis por nin renkonti, kaj vidante nin alveni, ili dankis pro la Dia favoro. Ili diris, ke de tiu ĉi mateno terura tempesto furiozis kaj domoj ruiniĝis. Ili scias, ke la maro estas tre maltrankvila kaj ili timis pri nia sorto. Je nia alveno al Ajabe, la Fondintino ridante demandis: « Ĉu vi bone amuziĝis dum via vojaĝo, Sinjoro? » Sinjoro respondis: « Mi nur dankis al Dio pro lia favoro ». La Fondintino diris je sia vico: « Hodiaŭa reveno via estis vere signo de Dia helpo ».

Dufoje antaŭe sinjoro O. Deguč iris kun la Fondintino al la insuleto kaj kun pia atento li elvazis la logloton de la mara spirito. Nun li kverzaŭ sinmuzeme iris kun siaj dudek disĉiploj por provi ilian fidon. Tial amplena Dio donis al li la okazon fari tion ĉi eksperimenton, por ke li povu reformi la kuron de la disĉiploj:

El « Sinjoro Skribo », tradukis K. N.

Homa nekonskvenco kaj milito

En vilaĝo aŭ urbo mortigo estas farita. La gazetaro sciigas tion per larĝaj, nigraj rubrikoj. Kolono post kolono rakontas la okazintaĵojn.

La legantoj skuas sian kapon kaj sentas abomenon. Estas ja kruda, nehoma ago. Mortigi senkulpan homon! Kia bestaĵo! Mortigo! Oh...

Neniu el ni povas aŭ volas nei, ke mortigo estas abomenaĵo, io nehoma. Ne! Mortigi homon, fraton, kiu havas precize saman rajton vivi kiel ni ĉiuj, jes, tia ago estas besta.

Sed estas vere strange, ke la homoj ne ĉiam havas similan penson pri mortigo.

1914-1918 donas bonegan ekzemplon.

Milionoj da homoj tiam vivis por mortigi. Senkulpaĵ viroj, virinoj kaj infanoj estis buĉataj. Kaj krom tio oni ŝtelis kaj detruis.

Kaj kion la gazetaro tiam diris? Ĝi laŭdis la krimojn. Informis, ke la propra armeo mortigis dek mil « malamikojn » dum la lasta batalo ktp. Kaj tio ĝojigis la hejmesidantajn legantojn, tiujn, kiuj pactempe skuis la kapon antaŭ mortigo.

Kiu dum la batalo frakasas sulfide multe da kapon, tiu ricevas medalojn kaj nomiĝis heroo.

Neniu skuis la kapon! Jes... kelkaj! Sed iliaj vortoj droniĝis en la granda sangsoifo, en la maro de la fanatikeco.

Tiujn homanikojn oni silentigis per malliberejo. « Perfiduloj », la homoj kriegis. « For ili! ».

Kia nekonskvenco!

La mortigantoj fariĝas « herooj » kaj la pacemuloj nomiĝas « perfiduloj ».

La homoj devas koni la veron. Ni montru ĝin al ili!

La maljustecon de la milito ni almontru ĉiam, ĝie kaj ĉiel, kiam la homaro mem ĝin rimarkos.

Ni krii sur la placoj: Milito estas amasmortigo! Estas rabadmortigo! Estas ŝtelado! Milito estas ĉio la plej terura, kion oni povas elpensi. Kaj neniam pardonindaj cirkonstancoj ekzistas.

Milito estas malbeno. Anatemu ॐ ĝi! Antaŭen al reciproka amo kaj paco!

EINAR DAHL, Svedujo.

METAPSIKO

(Daŭrigo de la Junia numero.)

Sr. A. Roubier, doktoro en farmacio ĵus skribis gravan kaj tre kuriozan monografion pri « la herbaĵo kiu igas okulojn mirigitajn ». Tiu kreskaĵo la pejoll'o estas kaktido kreskanta sur meksikaj altaĵoj kaj kiu havigas strangajn halucinaĵojn de l'vido. Ĝiaj aktivaj principoj estas entenataj en la supraĵoj de la kreskaĵo, kiun oni tranĉas laŭ disketoj, la « mescal-beans » por la komerca negoco. Ili entenas ses alkaloidojn kies du ĉefaj estas meskolino kaj loforino. La meskolino agas sur la cerbo estigante kolorajn viziojn, kaj la loforino agas sur la ostocerbo kaj spina medolo; sed entute ili veneneco por homo estas tre malgranda. Ili kaŭzas du sinsekvajn statojn: unue ĝeneralan ekscitigon kaj enforion, poste nervan malviglecon kaj halucinaĵojn. La vivado fariĝas pli akuta, la uzinto rimarkas kun ekmiro malgrandajn detalojn, pri kiuj li ne atentus dum normala stato. Li vidas la refulon ampleksiĝi, kaj fariĝi eksterordinare impresibla de la koloroj. Kiam la periodo de ebrieco estas plene atingita, la spaco ŝajnas plenigita de fumo aŭ superŝtusa de malvaj aŭ verdaj lumetoj, la objektoj envolvigas en aŭreolon. En mallumo la uzinto vidas kolornakulojn, kiuj aliformiĝas kaj kovriĝas per geometriaj formoj unuforme multobligitaj, kaj kiuj rememorigas pri neĝaj floriĝadoj, japanaj blazonoj aŭ orientaj tapiŝoj. Foje miliardoj da eraĵ punktoj, veraj fajrartajoj. Ĉiuj gustumintoj de « pejoll'o » interkonsentas pri la fea-intenseco de l'koloro kiu tamen kaŭzas nenian blindigon. Ofte la vidadoj restas pure orumaj, alfoje ili havas karakteron realan aŭ ĥimeran, fine ili povas esti konsiderataj kiel metapsikaj vizioj, t. e. ekzemple, ili povas elmontri realaĵojn neniel konitajn de la eksperimentanto. Tiu nova magia herbo certigas de la parenceco, jam montrita de la psikologoj, de la metapsika aŭ somnambula transo kun cerba venenigo.

(Fino.)

El *Mercur de France*.

René SUDRE.

Trad. Jo Lo.

JAPANAJ RESPONDOJ

Ĉiu leganto de O. I. rajtas demandi pri aferoj, koncernantaj *Japanujon*. La demandanto legos la respondojn sub tiu ĉi rubriko, kiun ni plezure disponas al ili. Ĉiu demando devas porti la titolon: « Japanaj Respondoj » kaj devas esti aparta folio.

A. Kudela, Olomouc. — Ĉu oni trinkas teon en Japanujo kun la algo « Kamuha » por kuraci arteriosklerozon? La algo en la teo vivas kaj kreskas tiel, ke post kelkaj semajnoj oni povas ĝin partigi en du porcioj.

Resp. — En Japanujo oni neniam lasas la kuiritan teon dum multa tempo, ĉar la teo veneniĝas, laŭ la popola kredo. Eĉ se ĝi ne veneniĝas, ĝi almenaŭ malboniĝas kaj estas netrinkebla. Laŭ mia scio, oni neniam lasas algojn en kuirita teo. La japanoj tre ŝatas la algojn, kiel manĝaĵojn. La sekigita algojn oni pecigas tre simile al teo, kaj tial oni nomas ĝin « algoteo », kiun oni trinkas, enmetante en varma akvo.

Similan trinkaĵon preparitan de miksitaj teo kaj algoj mi ne konas. K. N.

(1) En tiu ĉi libro estas pluraj rakontoj; nia traduko estas unu el la « perloj de la Korbo ».

LASTHORE

Kun ĝojo ni ricevis de la fonto el nia centro de Universala Homama Oficejo en Kameoka la ĉi subnaskiĝo, kiu senfine kuraĝigas nin por la sankta celo. Plej espereble, niaj okcidentaj kunlaborantoj marŝos antaŭen en plena harmonio kaj solidara unuiĝo.

Eŭropa Centra Oficejo de U. H. A.
49, rue Boulevard, Paris 14^e.

Kameoka, 13-8-1927.

Estimataj Kunlaborantoj,

Multajn dankojn ni havas al vi pro via senĉesa klopodado por la sankta standardo de homaromo.

Ke nia Asocio tiel rapide kreskis en nur pli ol du jaroj de sia naskiĝo, ni pensas, venas de via sindona laborado, sed je nia forta konvinko tio estas unue dank' al la granda ama virto de Sankta Sinjoro Onisaboro Degučĉi, la fondinto de U. H. A., kiu dume neniam forlasis sian favoran zorgon por ĝiaj paŝoj.

Nun ni ĝojas sciigi al vi, ke Li ekstaris kiel reganto de l' tuta U. H. A. tiel en nomo, kiel en praktiko, ĝustatempe la 10-an de Aŭgusto, kiam ja tempo por tio venis.

Tio ĉi estas efektive epokfara por nia pacmovado kaj devas esti granda beno por la tut-homaro, ni kredas.

Finante tiun ĉi sciigon, ni esperas kore viajn solidan unuiĝon, bonan harmonion kaj pli kaj pli energiajn klopodojn.

Volu sciigi pri tio ĉi al viaj filioj.

Mi ĉiam restas via sincera

U. DEGUČĈI.

Prezidanto de U. H. A.

BIBLIOGRAFIO

En tiu ĉi rubriko ni konciĝe raportas pri ĉiuj al ni por duekzemplere senditaj libroj. Verkoj en aliaj lingvoj estas ankaŭ akceptataj.

Pro la libertemo de nia presejo en aŭgusto, ni nun eldonas duoblan numeron — por aŭgusto kaj septembro.

Dum la nelaboraj tagoj en la redaktejo amasiĝis multe da libroj, esperantaj kaj fremdlingvaj ĵurnaloj kaj revuoj.

LIBROJ RICEVITAJ :

Teljes Magyar-Esperanto Szótár (Hungara-Esperanta vortaro), kompilita de Toman Janos. La vortaro estas sufiĉe grandformata 370 paĝa, kaj tre ampleksa. Dankas por lia senlaca laboro. Mendebla ĉe Esperantista Munkások Egyesülete könyvtárod és terjesztő osztályánál, Budapest VIII, József-körút 9, I. em. 3. La prezo : 8 pengoj.

Kongreslibro de la XIV-a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio. La kongreso okazis en Soller (Mallorca), 5-7 de junio 1927. La libro estas ilustrita kaj bone aranĝita. Enhavas la liston de ĉiuj anoj kaj abonantoj de la Federacio.

Fajreroj, poemaro de Adalberto Smit. Eldono de Holanda Esperanta Oficejo, Laren, Holando. Prezo SM. 0.50.

Mistera Krime, unuakta komedieto de Mikaelo Cases. Prezo 40 Speskedoj (unu franko). Aĉetebila ĉe la aŭtoro, Str. Salmeron, 229, 4. 2-a, Barcelono.

Unu fojon... Humorajaro de la sama aŭtoro. Kelkaj el la humorajoj estas vere tre spritaj.

Esperanto. Libreto enhavanta 50 modelajn leterojn pri komerca korespondado. Ĝi povos esti utila por la komercistoj, kiuj havas komercajn rilatojn kun la fremdlandaj firmaoj. Prezo : 75 Pfg. Eldono de Wilhelm Violet en Stuttgart.

Enkondukiilo. Rekomendinda por la komencantaj esperantistoj. Vidu la anoncon en la nuna numero de O. I.

Der Geistige Artz, Eldono de Neu Geist, Pfullingen i. Württ.. Germanujo.

Der Uranstaat, Wer trägt die Schuld Weltfreig?

La Suno Hispana. Raportas pri la okazonta VII-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj de la Hispana Amerika Ĕkspozicio en Sevilla dum Oktob.-Nov. 1928.

Germana Esperantisto.

La Progreso (Prahaj). Ĝi anoncas, ke la radiaj medioj komencis pli kaj pli esti atentemaj rilate al Esperanto.

La Revuo Orienta (Tokio). Krom la multaj propagandaj artikoloj pri Esperanto ĝi informas, ke la Japana Ministerio de Statfervojoj eldonis « Gvidlibreton por japanujo ». Jen imitinda ekzemplo!

Esperanto en Nipponlando (Tokio). Prezentas al siaj naciaoj sciigojn pri la 19-a Kongreso de Esperanto en Danzig.

Esperanto Praktiko. Kongres-numero Danzig.

Sennaciulo. N-roj 146-149. Havas artikolojn pri la plondono de la esperantaj poŝtmarkoj de Rusujo, pri la defendo de Sacco kaj Vanzetti, ktp.

Espero Katolika. Julio, aŭgusto. Prezentas informojn pri la katolika vivo en diversaj landoj.

La Nova Tago. Internacia Bahaa Esperanto-Gazeto.

Espero Teofofa, 3-a numero. Havas interesan artikolon « Origino kaj celo de Malnovaj Misterioj ».

International Language, julio, aŭgusto.

Libera Laboristo, Der Arbeiter-Esperantist, Skolta Heroldo, Konkordo, Ondo de Daŭgava, Esperanto Junularo, Fluganta Skribilo, Informoj de Esperanto Asocio en Estonio, The British Esperantist, La Vojo de Klerigo, La Interligilo de P. T. T., Berliner Esperanto-Anzeiger, L'Araldo Esperantista (vidu la anoncon), *Sommar 1927, Munkáskultura, Der Freidenker, Proletarischer Zeitung, Der freie Arbeiter, Esperanto-Prese-Dienst*.

La Libre Opinion (francalingva), pacifista revuo, havas unupaĝan artikolon pri Oomoto de S-ro Michelis di Rienzi.

Villemska Zvezda (bulgarlingva), enhavas preskaŭ en ĉiu numero artikolon reproduktitan de O. I. Pro tio ja ni devas danki nian bulgaran samideanon G. Dončev. La materialo de la revuo estas ĉiam diversa kaj tre interesa. Ni rekomendas ĝin al la bulgara samideano.

Magyaršig (hungarlingva), faris artikolon pri S-ro O. Degučĉi.

Die Glocke (germanlingva revuo), S-ro Burkert el Niemes faris artikolon en ĝi, kiu estas titolita « Aus der Oomoto-Bewegung ».

El Loto Blanko (bela hispanlingva revuo) represias nian artikolon « Gabriele d'Annunzio kaj la spirito de Franz Liszt ».

Die Weisse Fahne, organo de Neu-Geist en Germanujo publikigis la artikolon « Weltbund der Religionen » (La Ligo de Religioj).

La Revue Spirituelle (francalingva) pri psikologiaj studoj. *L'Ere Spirituelle, Deutsche Kurzschrift, Vegetarische Presse*.

Heroldo de Esperanto, kies aŭgustaj numeroj detale raportas la grandan sukceson de la 19-a U. E. Kongreso en Danzig.

Unity. Nuntempe multe raportas pri ĉina situacio. *La Renouveau*, semajna francalingva revuo, propagandilo de la judoj. Havas sciigojn pri la juda vivo el la tuta mondo.

Esperanto. Junia numero de U. E. A. kun la 4-a oficiala informilo de la 19-a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig.

BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj. Eldono de Bohema Esperanto Servo, Moravany. Enhavas Adresaron de Esperantistoj kaj de E.-entreprenejoj (societoj, institutoj, servoj, gazetoj, libretoj kaj eldonejoj, firmaoj uzantaj Esperanton) laŭ landoj. Prezo 0.50 Fsv.

Roja, « Nova Universala Lingvo » (!?) La kreintoj verŝajne ne konas la ekziston de nia universale uzata lingvo Esperanto.

**

Lastatempe ni ricevis de nia fervora samideano S-ro K. O. Schmidt, Germanujo, grandan amason da germanlingvaj ĵurnaloj, kiuj enhavas longajn kaj favorajn recenzojn pri la germanlingva broŝuro « Oomoto ». Inter la ĵurnaloj ni citu : *Neueste Nachrichten, Nordhäuser Zeitung, Billacher Zeitung, Der Landbote, Vossische Berlin Zeitung, Konstanzer Zeitung, Der Ulmer, Lausitzer Landes-Zeitung*, k. a.

LETERKESTO

Ni ricevis la abonkotizojn de S-roj Hans Kanitsar, Schottwien am Semmering, Aŭstrujo; D-ro Sebestyan Imre, Budapest, Hungarujo; Ch. Marseille, Paris 11^e. N. Warhaftig, Augustowie, Polujo, por 4 broŝuroj, 10 fr. fr. « Verda Mondo » sendita al vi. Al ĉiuj koran dankon!

A. M. Riswick, Rotterdam. — Ni konsentas al via propono. Vi ricevos nian ĵurnalon. Se vi enmetus nian anoncon en « Holanda Esperanto-Piŝoro », ni estus tre dankemaj al vi.

Esp. Rondo, Zagreb. — Ĵurnalaro sendita al vi por via ekspozicio.

**

Vi, kara leganto, kiu ricevas nian ĵurnalon, kaj ne ankoraŭ abonis ĝin, bonvolu sendi vian abonkotizon, se vi havas tian eblecon. Ni estas certaj en nia konvinko, ke « Oomoto Internacia » plaĉas al vi kaj, ke ĝi meritas esti abonita.

Oomotoano volas korespondi per L. PK. II. precipe kun Azio : S-ro St. Tamulaitis, Lekeciai, Kurok, Litovujo.

L'Araldo Esperantista

“ ESPERANTHEROLDO ”

ĉiudusemajna Esperanto-ĵurnalo

Direktoro-Fondinto : KONRADO CHERRI

DIREKTEJO - ADMINISTREJO - REDAKTEJO :

AREZZO (Italujo)

La plej malmultekosta — disvastigata — aktuala
4-8-paĝa — grandformata

ELDONOMBRO : 6000 ekzempleroj

FAVORA ABONPAGO :

Lit. 8,— aŭ Sv. Fr. 3,—

de 1-an de julio ĝis 31-an de decembro k. j.

SAMIDEANOJ,

Subtenu tiun ĉi ĵurnalon. Ĝi estas la plej subteninda, ĉu por ĝia disvastigo kaj abonpago, ĉu por ĝia estonteco.

Ne forgesu, ni korege bonigos ĝian enhavon laŭ bezono.

Skribu tuj. Ni serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj.

Sed ni bezonegas almenaŭ 1000 abonontojn
ABONU, ABONIGU ĜIS 1000 ABONOJ

PROPAGANDISTOJ! KURSGVIDANTOJ!

PLIFACILIGU LA LABORON POR
NIA KARA ESPERANTO PERE DE

ENKONDUKILO
en fundamentajn regulojn
de la mondlingvo Esperanto

Per simplaj ekzemploj la lernanto
divenas la ĉefajn regulojn kaj notas
ilin naĉlingve sur aparta paĝo apud
la Esperanta teksto.

PREZO

Por 2 ekz. : 1 respondkupono	} aŭ samvaloro inkluzive de la sendkostoj.
— 10 — 4 —	
— 50 — 16 —	

Eldonejo : ESPERANTO - JUNULARO

A. NEUPERT, Wedellstr. 17,
LEIPZIG N 23, Germanujo

Le Gérant : HENRI SELVES

Oomoto-Preĝejo Esperantista (V. Polgar), 33, rue Lacépède, Paris, V^e